

STARTO

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO · 1977 · No 1 (58)

Jubilea konsultiĝo en Moskvo

De la 14-a ĝis la 16-a de decembro en Moskvo kunvenis la ĉefaj reprezentantoj de Esperantaj organizaĵoj en europaj socialismaj landoj.

Konsultiĝon organizis Unio de sovetaĵ societoj de amikeco kaj kulturaj ligoj kun eksterlandaj landoj, en kies kadro laboras ankaŭ la Komisiono pri internaciaj ligoj de sovetaĵ esperantistoj.

La konsultiĝo estis riĉa laŭ sia programo kaj perfekte organizita. La partoprenantoj havis eblecon trakti ne sole kun sovetaĵ esperantistoj - mondkonataj homoj de interlingvistiko kaj esperantologio, sed ankaŭ kun funkciuloj de Unio, kiuj respondecas pri evoluo de esperanta movado en USSR.

Estas certe, ke tiuj ĉi kontaktoj estis tre utilaj por movado. Kiel ĉiam estis diskutitaj demandoj pri disvastigo de Esperanto, multflankaj rilatoj inter la esperantaj organizaĵoj, pri kunlaboro kun UEA, pri pli vasta interŝanĝo de spertoj, gazetoj, libroj kaj homoj.


La asocioj informiĝis pri la aktiveco por jaro 1977, kiu estas plen-plena je eventaj datoj, kiel estas 60-a datreveno de Granda oktobra socialisma revolucio, 90-a datreveno de naskiĝo de Esperanto kaj 60-a datreveno de la morto de Dr L. L. Zamenhof.

La partoprenantoj sendis saluttelegramon al Ĝenerala sekretario de KPSU L. Breĵnev okaze de lia 70-a naskiĝtago.

Krome estis decidite organizi la venontan konsultiĝon en GDR en marto 1977.

Křimský Z.

Tri sovetaĵ esperantistoj
plaj okupitaj dum la renkontiĝo:
Maldekstre:
Samodaj, Berjoza, Isejev


Salono, kie oni traktis



Komuniko

pri la IX-a Konsultiĝo de Esperanto-organizaĵoj de eŭropaj socialismaĵ landoj

Ekde la 14-a ĝis la 16-a de decembro 1976 en Moskvo okazis la IX-a Konsultiĝo de Esperanto-organizaĵoj de eŭropaj socialismaĵ landoj: Bulgario, ĈSSR, GDR, Hungario, Pollando, USSR.

La Konsultiĝo aŭskultis kaj pridiskutis raportojn pri:

- 1/ Internacia situacio kaj rolo de progresema esperanto-movado en porpaca batalo, internacia kunlaboro kaj efektivigo de interkonsentoj de la Fina Akto de Helsinki-konferenco /1975/;
- 2/ Sesdekjara jubileo de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio;
- 3/ La Tutmonda Asembleo de Packonstruantoj en Varsovio /1977/;
- 4/ Aktualaj problemoj de esperantologio;
- 5/ Problemoj de kunlaboro de socialismaĵ landoj.

La Konsultiĝo varme subtenas la decidemon de la socialismaĵ landoj daŭre efektivigi la komunan agadon direkte al plifirmigo de paco kaj sekureco en Eŭropo kaj en la tuta mondo, al profundigo de malstreĉiĝo, al firmigo de la principoj pri la paca konekzistado inter ŝtatoj kun diversaj sociordoĵ.

La partoprenintoj substrekis la signifon de la 60-jara jubileo de Granda Oktobra Socialisma Revolucio, informis unu la alian pri entreprenataĵ iniciatoĵ dediĉitaĵ al tiu granda datreveno, kaj en tiu senco pligrandigos la multflankan kunlaboron.

En la kadro de la Konsultiĝo okazis renkontiĝo kun Moskvaĵ esperantistoj en la Domo de Amikeco.

Moskvo, 16. 12. 1976

**sts
mimoň, n. p.**



Opravy traktorů
GO tahačů št 180
Opravy zemědělských strojů
Renovace navěšecí technikou
Montáže a opravy stájové mechanizace
Elektroinstalace a hromosvody
Ochrana rostlin
Polní mechanizační práce

SLUŽBY ZEMĚDĚLSTVÍ

V těchto profesích nabízíme zaměstnání

PŘIJĎTE MEZI NÁS !

Informace podá KPU STS Mimoň, tel. 2351-5

V mravenčí a každodenní práci

Do nového roku se obvykle přeje mnoho úspěchů, zdraví a pohody, lidé si dávají předsevzetí a slibují si, že budou žít a jednat lépe než v minulém roce.

Můžeme říci bez nadsázky, že náš svaz udělal loni velký kus práce, s kterým se lze pochlubit. Přes všechny problémy naší zájmové společenské organizace s poměrně malým počtem členů, kteří jsou nuceni dělat značnou část profesionální práce dobrovolně a ve volném čase, je možno říci, že svaz překonal období určité nejistoty, stagnace a obav. Drtivá většina našich členů pochopila, že jenom v mravenčí každodenní práci je úspěch a rozešla se s neseriozními názory jednotlivců, kteří propagují esperanto jako všelék na bolesti lidstva. Víme, že takováto argumentace spíše odradí než získá.

A tak se společně těšíme z desítek drobných i velkých akcí, které jsme společně pořádali a připravovali. Chtěl bych vám všem poděkovat za snahu, za nové nápady, za trpělivost a obětavost a chtěl bych vás poprosit, abyste vytrvali, abyste nám pomáhali svými radami, ale také přijímali, co vám předkládáme jako doporučení, která vzešla z mnoha porad a diskusí i mnoha zkušeností a snad i širšího pohledu na potřeby a možnosti svazu.

V letošním roce před námi stojí další závažné úkoly, o kterých informuje Plán činnosti svazu. Zajímejte se o tento plán všichni, je vám k dispozici u vedoucích vašich skupin. Pomáhejte svou účastí na plnění úkolů. Jenom tak budeme moci ke konci roku říci, že jsme splnili co jsme slíbili. Rok 1977 bude i rokem významných politických i esperantských výročí. Členové našeho svazu by neměli stát mimo. Jedině ve spojení s potřebami našeho státu a mezinárodního socialistického společenství se může uplatnit esperantské hnutí v Československu.

Dovolte mi také, abych poděkoval za celé předsednictvo ÚV ČES a sekretariát svazu i jménem svým za nesčetná přání k vánočním svátkům i novému roku od vás i ze zahraničí. Velice nás posilují a dodávají chuti k práci, která mnohdy není lehká.

/Zdeněk Krámský, tajemník svazu/

MEM peranto



LA PLANO POR 1977. Al ĉiuj MEM-perantoj kaj Lokaj Grupoj - kie oni ankoraŭ ne elektis la respondeculojn pri la MEM-agado-oni dissendis la bazan laborplanon por la kuranta jaro. Tiu-okaze ni alvokas ĉiujn aktivojn informi la sekcian komitaton /sekretariino V. Kvasničková, ĈRA, Jilská 10, Praha 1/ pri la aktivecoj plenumitaj en 1976 kaj preparataj por 1977. La nepra tasko estas plivigligi kunlaboron kun la lokaj pakkonsilioj, provi utiligi E-on en iliaj internaciaj kontaktoj kaj propagandi la porpacan agadon de la esperantistoj.

APERIS LA NOVA ĈS. PACO-NUMERO /1976/. Ĉia temaro tuŝas la problemojn de la senarmigo kaj paca kunvivado, krome troviĝas tie ankaŭ beletraĵeroj kaj lingva eseo La ĉefaj principoj de Esperanto, kies aŭtoro estas akademiano K. Pič. La ekstra aldono, kiu estas senpaga por la abonantoj, portas la titolon "Kanto super lulilo". La libreto enhavas sur 32 paĝoj verkojn de la ok modernaj slovakaj aŭtoroj.

ARONU PACON SENPROKRASTE! LA PREZO POR LA TUTA JAR Kolekto estas 30 Kčs.

Prepari la grundon por novaj gajnoj

EL NOVJARA MESAĜO DE LA PREZIDANTO DE UEA

La pasintaj du-tri jaroj instruis al ni multajn lecionojn. El ili, la plej klara estas la rimarkinda stabileco kaj interna forteco de la Esperanto-movado. Se necesas ankoraŭ pruvi tion, oni povus konstati, ke la Internacia Lingvo fariĝis neevitebla kaj nedetruibla fakto de nia epoko.

Tra ĉiuj perturboj de la tuj pasintaj jaroj, tra ĉiuj krizoj financaj kaj organizaj, UEA tenis la flagon alta kaj laboris diligente por konservi malnovajn gajnojn kaj prepari la grundon por novaj. Nun ni komencas rikolti la rezultojn de tiu eksterordinara diligento -- kaj ankaŭ lojalo -- de nia centra stabo kaj de nia membraro. En 1975 ni sukcesis registri pozitivan saldon post kelk-jaraj deficitoj en niaj financoj. Feliĉe ni povas anonci similan rezulton en 1976.

Tiu restarigo de la financa stabileco ankaŭ havis siajn konsekvencojn ĉe la membronombro: post kelkaj jaroj da perdo, en 1976 ni registris malgrandan gajnon en la nombro de individuaj membroj. Se oni aldonas al tio la aligon de kelkaj novaj landaj asocioj kaj la signifan plivastigon de la kolektiva abonado de la revuo, oni tuj ricevas bildon de asocio pli sekura, pli forta, kaj pli laborpreta ol ni vidis jam de pluraj jaroj.

Estas bela periodo por labori por Esperanto. Kvankam la publiko restas skeptika, fermita en la propraj intereso, ĉi tiu periodo estas pli bona -- iom post iom, malrapide sed senteble, ni lernas kiel alpaŝi ĝin kaj kiel disciplini nin mem en la intereso de la pli granda idealo. Ĉefe ni ankoraŭ devas lerni kiel konvinki la publikon pri la graveco de la lingva demando -- pri la danĝeroj de lingva superregado kaj lingva diskriminacio, pri la kosto de lingva diverseco, pri la neceso de tutmonda komunikilo -- kaj en tiuj kunteksto injekti la ideon de la Internacia Lingvo Esperanto, sola praktika solvo de la tutmonda lingva problemo. Por atingi tion, necesas rapide kaj decide plifortigi preceptojn nian informadon kaj niajn eksterajn rilatojn ĝenerale.

La jaro 1977 portas nin al punkto nur dek jarojn for de la unua jarcento de la Internacia Lingvo. Ĉu tiu dekjara periodo kondukos nin al la sojlo de sukcesigo de la heredaĵo de Zamenhof? Tio dependos grandparte de nia kapablo je sagaco, sindediĉo kaj efika laboro. La jaro 1977 la komenca punkto de tiu eventuale decida jardeko, alportu diligenton kaj laboron, sagacon kaj klarvidon, kaj feliĉon kaj finan sukceson al ĉiuj laborantoj por la Internacia Lingvo. Nome de la Estraro de UEA kaj ĉiuj aliaj aktivuloj en ties organiza strukturo, mi deziras al vi paĉan kaj prosperan jaron 1977.

/Humphrey Tonkin/



*-7-a KONGRESO DE ASOCIO DE ESPERANTISTOJ DE SLOVAKA SOCIALISMA RESPUBLIKO okazos en Bratislava de la 6-a ĝis la 9-a de majo 1977. Oni preparas valorajn kulturajn programojn, laborajn kunsidojn, unuajn ekzamenojn pri Esperanto kaj pri instruado de Esperanto, same kiel multajn renkontiĝojn. Aliĝojn akceptas ĉi tiu la 1-a de marto 1977 Komitato de la 7-a Kongreso de AE SSR, poŝt-fako 1/D, 899 01 Bratislava. Aliĝilo kun informo pri la prezoj estas ricevebla ĉe la Komitato.

Karolo Piĉ: PSEŬDOelementoj

En aglutiva lingvo de Esperanto-tipo ne povas ekzisti pseŭdoelementoj. Ĉar en tia lingvotipo ĉiu pseŭdoelemento tuj tendencas aŭ elfali aŭ fariĝi ordinara regula elemento. Pseŭdoelementoj estas do aŭ trompo kaj mistifiko, aŭ grava miskompreno.

Same ni povus demandi, kio estas "internaciaj vorteroj". Ĉar ankaŭ tiun ĉi vortkategorion Esperanto ne konas. La tiel nomataj pseŭdoprefiksoj, pseŭdosufiksoj, pseŭdoprepozicioj kaj "internaciaj vorteroj" estas nur ruza konstruo, kies sola celo estas trudi al Esperanto tute novan, neregulan, tipe okcidentalisman derivadistemon, absolute fremdan al la Zamenhofs !

Pro tio pre ne estas prefikso, kiel voĵus kredi PIV /kaj Ido!/, sed tute ordinara prepozicio, same kiel antau. Cetere kiel prepozicion, en 1906, en sia Projekto pri Neologismoj ĝin proponis jam Zamenhof. Tiam tamen il previdadis, ke pre estos eklude nur prepozicio de la loko. PIV kontraue ĝin konsideras ĝimpla tempoprefikso. Envere pre estas nenio alia ol sinonimo de antau, sinonimo kaj en la loka kaj en la tempa sencoj. Tamen ĉu prepozicio, ĉu prefikso, pre feliĉe ne renversas la esperantan vortfaradon, sed nepre ĝi degradas kelkajn ĝisnunajn radiokojn al nuraj vortoj derivitaj: pre-cedo /precedenco/, pre-ludo, pre-lego, pre-veni, pre-skribi, pre-sidi, pre-vidi, pre-destini. Tamen ĝuste tiel ĝi grave kunhelpas al la plua, interna simpligado de Esperanto.

Nepran pliriĉigon de la lingvo prezentas eĉ la grekdevena prefikso eu-, donanta al la vortoj nuancon de boneco, respektive de beleco, simpateco, agrableco. Ĝi troviĝas en evangelio /kiu, tial, devus soni eu-angelio/ kaj krome ankaŭ en eutanazio, euritmio kaj aliaj. Tamen eu- estas sukcese uzebla eĉ en la literaturo kaj Komuna lingvaĵoj: Si premas sin al li, si eutremas. Dolĉaj euspasmoj tradukas ŝian korpon. Si eugemas kaj eusubspiras.

Iom alia estas la kazo de la prefikso des-. Ĝi estas tipa Ido-ido, kio per si mem ne tre gravus. Ja ankaŭ Ido, Esperantido, Novial, Occidental abunde transprenadis, interalie unuavice ĝuste el Esperanto. Tial des- ne estas malbona pro tio, ke ĝi estas idista; ĝi estas malbona pro tio, ke ĝi ne estas sufiĉe klare difinita. Aliflanke PIV tute ne hezitas alprenadi eĉ diversajn aliajn Ido-elementojn. Tial en ĝi, cetere komplekte senĝene, paradas ne nur pre-, sed ankaŭ cis-, -iv, -iz, retro kaj similaj. Kaj estas interese, ke denaske idista estas eĉ la mistama kaj fikonata, ĉiam denove trudata kaj ĝis nun ne trudita land-sufikso -i'. Tion pli strange impresas la subita PIV-antipatio al -oz', eldire esprimita en la koncerna rimarko: Sub la influo de Ido oni kelktempe uzis - oz' adjektive, por indiki la abundecon de konsistiga elemento /poroza, ŝtonoza/: oni nun uzas aŭ simple la a-formon, aŭ kunmetaĵon kun -abunda, -dona, -hava, -plena, -riĉa. Tiu ĉi rimarko tamen estas iom senenca pro tio, ke en la antaŭaj eldonoj de Plena Vortaro, en la ĉapitro Sciencaj kaj Teknikaj Afiksoj oni ne nur registradis -oz', sed eĉ kvazaŭ rekomendadis ĝin jene: -oz': Sufikso uzata por formi vortojn kun la signifo: provizita de, plena de, riĉa je k.s.: sabloza / sabloriĉa / .Nu, ĝuste tial mi ne vidas kaŭzon kial ekstermadi ĝin, tiom malpli ĉar -oz' perfekte kongruas kun la tuta vortmaterialo de Esperanto, kiun ĝi taŭge riĉigas. Cetere, kiel ni ĵus vidis, PIV diversajn aliajn Ido-elementojn ne nur ne malakceptas, sed eĉ subtenas, kvankam ofte ĝi donas al ili tute diferencajn, rekte erarajn kaj erarigajn difinojn, nepre malpli klarajn kaj precizajn ol la originalaj klarigoj de Ido, kiel tiel tiel ekzemplas ĝuste la jam citita des-, kiu en Ido esprimas kontraŭon, malon, mison, kvankam en PIV ĝi signifas simple senigadon. Laŭ la Ido-difino oni povas tiri regulaĵajn derivaĵojn des-organizi, des-honori,

des-infekti, des-informi, des-odori /kiuj fakte estas mis- organizi, mal-honori, mal-infekti, mis-informi, mal-odori/. Lau PIV la uzado de des- ne estas tute klara. Verŝajne pli precizas des-honorigi, des-odorigi /ĉar sen-honorigi, sen-odorigi !/. Ĉiukaze la franca aserto/ pli precize: la pia franca kredo /, ke des- aŭtomate nenecesigas - ig, estas nur unu plia naturalisma iluzio, ne trovanta apogon en Esperanto. Ĉar inter des-odori, des-honori, kaj des-odorigi, des-honorigi diŝas precize la sama diferenco, kiu diŝas inter mal-honori, mal-odori kaj mal-honorigi, mal-odorigi. Krome Esperanto /kaj la esperantistoj/preskau alergie malferas ĉiam nelogikan intermiksadon de -i kaj -igi. Prave ! Ĉar transitiveco kaj netransitiveco ne estas nur du malsamaj gramatikaj kategorioj, sed ĉefe du tre gravaj kategorioj logikaj, preskau du kontraŭaj mondoj, same kontrastaj kiel lumo kaj mal-lumo, bono kaj mal-bono, materio kaj anti-materio. Ni prenu des-espero kaj des-iluzio ekzemple ! Mi povas diri mi des-iluzias, mi des-esperas same kiel mi povas diri mi malĝojas. Mi ne povas diri tio des-esperas, tio des-iluzias min, ĉar mi, ankaŭ, ne povas diri tio malĝojas min. Ambaŭkaze do -ig estas neevitebla: tio malĝojigas, desiluziigas, des-esperigas min ! Sed jen kial des-, ĉu kun la idista, ĉu kun la plenilustrivortara difinoj provizore estas pli dubinda ol fidinda kaj pli diskutenda ol tenenda /prebare, ĉu vi scias, ke ankaŭ tiu -end estas ja idista ?/Kaj tiel la ĝusta difino de des-, kuŝanta, kiel ĉiam, ie meze inter la du ekstremoj, restas trovota! Ni serĉu ĝin!

Sed en PIV abundas eĉ "vorteroj" kiel tele-, retro-, pseudo-, anti-, infra-, intra- kaj aliaj, kiujn PIV, tute senlekte kaj sen la ajn sistemo nomas jen prefiksoj, jen adverboj, jen vorteroj, kvankam preskau senescepte temas pri tute aliaj vortkategorioj. Tiel tele- ne estas vortero, sed prefikso: ĉiuj hodiaŭaj teleaj rilatoj okazas danke al la modernaj teletekniko kaj telekomunikiloj. Pseudo-, retro- /laŭ PIV: prefiksoj/, infra /laŭ PIV: adverbo, kun -a ! /, intra /laŭ PIV: vortero/ estas simple adjektivoj.

Sekve Esperanton ne povas endangerigi tiuj diversaj pre-ĉu- aŭ hiper-, ĉar ili estas strikte konformaj al la tuta klasika materialo de la lingvo, sed fakte ĝin endangerigas tiuj ambiguaj "senkategoriaj" pseudo, retro, anti, mini, maksi- kaj aliaj, kiuj ŝvebas en la lingvotute senkatene kaj sen ia ajn reguloj, kaj kiuj fakte estas io alia, ol kio oni ilin deklaras. Tiel pseudo-, retro-, infra-, intra- estas nek prefiksoj nek vorteroj, sed simple nur adjektivoj pseŭda, retra, infra, intra. Ĉar se oni konsiderus ilin prefiksoj, oni ne povus derivadi la normalajn formojn pseŭda kaj retra, sed ja nur strangaĵn, monstraĵn, hibridajn kaj nenig uzatajn pseŭdo kaj retro /analoge al suba kaj transa/, aŭ la pseudoprefiksoj pseŭdo- kaj retro- devus ricevi parte modifitajn, kaj nepre iom sovaĝajn formojn pseŭd kaj retr. Kontraŭe la adjektivigo de tiuj falsaj prefiksoj ebligus vicigi ilin en la esperantan sistemon, eĉ sen ia ajn domago. Ankaŭ poste ni ja sensange plu uzus pseudoradiko, retroiri, infraruĝa, intraŝuskola, sed anstataŭ paroli pri vortoj derivitaj, ni parolus pri vortoj kunmetitaj. Krome retra, retra, retra, retra, retra evitigus al ni strangaĵojn de la tipo iri retro, kiujn ili anstataŭigus per la natura iri, paŝi retro, respektive retren, ĉar retra estas ja returnira, returniranta, kaj retra signifas returnire, tiel ke retr-o-iri estas kunmetita tute same kiel ekzemple kanĉo-iri.

Ĉiu nova elemento, ankondukata en Esperanton, devas trairi tiun sisteman, skemigan, asimiligan procedon, kies celo estas konformigi ĝin al la internaj leĝoj de Esperanto kaj al ĝia spirito.

PIV, malfeliĉe, tiujn diversajn "vorterojn" ne ensistemigas. Tial, en ĉi tiu stato de duonvojeo, nematureco, ĝiaj pseudelementoj estas nur kontraŭfundamentaj monstroj, kiujn estos necese kribri kaj aŭ adapti al la sistemo, se ili montriĝas adapteblaj, aŭ ilin forĵeti, se asimililo, asimiligo ne estos ebla.

Precipe la enkondukado de novaj konjunkcioj, prepozicioj, afiksoj kaj aliaj helpaj vortoj ne estas malaprobinda. Ĉar iel ĝi estas eĉ pli grava ol la enkondukado de ordinaraj novismoj. Sed ĝuste tial ĝi devas okazadi tre konscie kaj singarde. Se oni eraras pri ordinara novismo /pri mava ekzemple/, la miselekto koncernas nur la novismon mem, kaj ĝi decidas maksimume nur pri tio, ĉu la novismo sukcesos teni sin, au ĉu ĝi simple malaperos kaj forfalos. Se oni eraras pri konjunkcio, prepozicio au afikso, la afero estas multe pli komplika.

Ĉar tiam la miselekto koncernas ne nur la novismon, pri kiu estas la parolo, sed iel la tutan lingvon.

Principe la riĉeco de formoj ne ĉiam alportas ankaŭ la adekvatan riĉecon de esprimoj. Ja iam la riĉeco de formoj povas esti eĉ rekte ĝena kaj konfuza. Ĉar multaj afiksoj ne estas nepra akiro. Ĉiuj postesperantaj projektoj abunde disvolvadis la afiksajn sistemojn, bedaŭrinde grandparte sen ia ajn videbla sukceso. Siatempe oni kritikis Esperanton pro tio, ke ĝi posedas nur unu solan adjektivformon - a. Ni lasu flanke la fakton, ke ankaŭ Esperanto ne havas nur unu solan adjektivformon. Tamen multaj adjektivosufiksoj ne estas avantaĝo. La harfenda Ida distingado sabla grano, sabloza fundo, sablatra sukro, sablea stofo, sablala utiligo, sablizita voyo ne estas pli preciza, sed paradokse nur pli konfuza kaj tiom malpli komprenebla ol la esperanta.

Tio tamen ne signifas, ke esperantistoj ne povus studi aliajn lingvoprojektojn. Kiel tutajoj tiuj projektoj ne alportas ion novan. Sed en ili, jen au jen, troviĝas interesaj pretaj solvoj, izolaj orgrajnoj, kiuj povus doni ion ankaŭ al ni.

Ni citis kelkajn Idajn elementojn, kiujn iom post iom transprenis Esperanto. Oni povus diskuti, ĉu dis-, -iv', -iz', retre, pre- kaj aliaj estas ĝuste idistaj. Certes, unuavice, la plejparto da ili ekzistis jam en la latina. Sed tio ne estas la ĉefdemando! Principe Esperanto povas transprenadi ĉiujn elementojn, kiuj ne kontraŭas ĝian internan sistemon kaj kiuj estas akordigeblaj al ĝiaj ĉefreguloj. Pro gravaj kaŭzoj, tamen, por Esperanto estas pli oportuna ĉerpi tiujn elementojn el aliaj parencaj projektoj ol tiri ilin ekzemple el la franca au latina. Ĉar en la franca au latina ili ekzistas en sia kruda, naturalisma formo. En Ido au Novial, kontraŭe, ili ekzistas jam en la eltrahita, kelkfoje distilita kaj zorge preparita planformo.

La skemeca Esperanto ne povas havi naturalisman vortfaradon. Laŭ la "naturalisma" vidpunkto la esperantaj -in-, -ar, -ge- kaj la aliaj certe aspektas iom "neordinare". Tamen, paradokse, nur ili estas plene adekvataj kaj funkcijaj. Ĉar al la autonoma Esperanto povas adekvate respondi nur same autonoma afiksaro.

Ni demontru tion per ekzemplo:

Esperanto tuj povus adopti la Ido-sufikson -e', kiu havas la saman signifon kiel la esperanta, cetera longa, peza, priskriba kaj maloportuna -kolora: violea /violkolora/, rozea /rozkolora/, sablea /sablokolora/, karbea /karbokolora/, flamea /flamkolora/, argilea /argilkolora/, firmanatea /firmanentkolora/, brikea /brikkolora/, akvea, marea, stela ktp. Kvankam ankaŭ tiu ĉi sufikso ne estas origine Ida, sed unuavice latina: rosa, ae, f. /rozo/ - roseus, a, um /rozkolora/, nix, nivis, f. /neĝo-niveus, a, um /neĝkolora, neĝblanka/, aurum, i, n. /oro- aureus, f. /orkolora/, flamma, ae, f. /flamo/ - flammeus, f. /flavruĝa, flamkolora/.

/Daŭrigota.../

*KIEL NI VOJAĜOS AL LA UNIVERSALA KONGRESO EN VARNA 1978 ?

Pri tio jam vigle traktas la fer-vojista sekcio kunlabore kun la turisma komisiono de ĈEA. Aligis ankaŭ la Asocio Esperantista en SSR. Oni antaŭvidas lu-prenon de aparta vagonaro kun litoj kaj bufedoj, kiu iros el Praha tra Česká Třebová, Brno, Bratislava kaj Stúrovo. Lau procedo de la preparlaboroj ni publikigados pluajn detalojn.

/lk/

*AŬTOĈARE AL BALTA MARO

La turisma komisiono de ĈEA kunlabore kun Esperanto-rondeto LA PONTO en Pisek preparas por la tagoj 1-a-10-a de julio 1977 aŭtoĉaran rondvojaĝon tra GDR. Oni vizitos Luzacion, Berlinon, plurajn lokojn sur la marbordo kaj Potsdamon. Prezoj kaj aliaj detaloj ankoraŭ ne estas fiksitaj, tial oni dume ne konfirmas aliĝojn. Interesuloj tamen ne forgesu frutempe plani sian libertempon por la menciita semajno.

/lk/

*NIA SUKCESO EN FILATELO

La komitato de la internacia ekspozicio de poŝtmarkoj OSTRAVA 76 sendis al ĈEA dankleteron por la kunlaboro okaze de la nomita ekspozicio, honordiplomon kaj oran medalon por serioza reprezentado de La Esperanto-movado enkadre de la ekspozicio en Ostrava.

/uh/

*SAKLUDU INTERNACIE

Ludo simila al nia ŝako havas sian originon en la 6-a jarcento en Hindujo. Al niaj landoj ĝi venis jam en la 11-a jarcento. La ŝak-reguloj ĝenerale stabiligis nur komence de la 18-a jarcento. La ŝakludo estas internacia kaj por la medio de esperantistoj ĝi estas ideala kiel korespondanta ludo.

Ĉu vi scias, ke ekzistas Esperanta Ŝak-Ligo Internacia /ESLI/ ? Ĝi ebligas al esperantistoj ŝakludantoj partopreni en la korespondaj turniroj kaj ŝak-festivaloj. Ĉiu interesiĝanto pri la ŝako sin turnu al la sekretario de ESLI :s-ano L. Fiala, Fugnerova 28/18, CS- 290 Ol Poděbrady.

/laŭ lf/

*PRI UNU SCIENC-TEKNIKA BIBLIOTEKO

La teknika sekcio de ĈEA fondis por siaj membroj bibliotekon. Ĝi enhavas provizore nur 60 titolojn inkluzive de gazet-artikoloj kaj prelegoj. Malgraŭ tio la biblioteko jam plenumas sian taskon, en la jaro 1976 okazis 27 elpruntoj. Nur malfacile estas akiritaj novaj eldonaĵoj el okcidentaj landoj, same la eldonaĵoj malnovaj, elĉerpitaj.

La teknika sekcio de ĈEA sin turnas al vi kun peto pri helpo: esploru vian stokon de esperantaĵoj, kaj se vi trovos ion en rilato al scienco aŭ tekniko, donacu ĝin al la biblioteko, por utilo al la 92 membroj de TS-ĈEA kaj 19 membroj de la frata slovaka TS-AE SSR. Serĉataj estas ankaŭ unuopaj malnovaj numeroj de SCIENCA REVUO el la jaroj antaŭ 1963, 1-a n-ro de "Homo kaj Kosmo" el la j. 1973 kaj la ekzempleroj pli malnovaj. Donacojn kaj proponojn pri vendo sendu al la zorganto pri Informa Pako de TS: Ing. J. Werner, Křoitova 84, Brno CS- 616 00.

* Recenzoj *

*POR LA PACO. Eldonis Komisiono pri internaciaj ligoj de sovetaĵaj esperantistoj en Moskvo, 1976, 48 pĝ. Redaktis V. Samodaj. La ofset- presita kajero enhavas i.a. paroladon de L. Breĵnev en la Konferenco pri sekureco kaj kunlaboro en Eŭropo, fragmentojn el la verkoj de M. Saltykov-Ŝĉedrin kaj A. Fadejev kaj la porinfanan paĝon.

*T. Jivkov: PACO KAJ SEKURECO POR LA POPOLOJ /Sofia-Pres, 1975/ Parolado de la unua sekretario de OK BKP en la helsinkia konferenco. Tradukis A. Griĝorov.

*J. van Munster: VIVO DE LABORISTO EN LA KOLONIA KAJ NOVKOLONIA EPOKOJ, Amsterdam 1976, 112 pĝ. Interesa pri- skribo de la eventoj inter la jaroj 1910 kaj 1945 fare de veterana esperantisto.

/lk/

*AŬTO-TURISMA VORTARETO hungara - esperanta - germana - pola - ĉeĥa - slovaka aperos en Hungario printempe 1977 en ĉirkaŭ 30 mil ekzempleroj kaj estos vendata ankaŭ en nia lando. La ĉeĥ- kaj slovack-lingvan tradukon pri- zorgis la teknikaj sekcioj de ĈEA kaj AE SSR.

✧ Renkontiĝo en Mělník ✧

okazos de la 22-a ĝis la 24-a de aprilo.

Provizora programo:

vendrede- alvsturo kaj enlĝiĝo laŭ antaŭa aliĝo /en kampadejo, hotelo Ludmila aŭ ĉe lokaj esperantistoj/. Interkona vespero en la kampadeja restoracio.

sabate- antaŭtagmeze laborkunsidoj de la sekcioj kaj komisionoj en la kampadejo

- inter la 14-a kaj 17.30 horoj aŭtobusaj ekskursoj laŭ anticipa individua elekto /vizito al la monto Říp kaj al la kastelo Kokořín - 15,-Kĉs/.Faka gvidaĝo.

- je la 19-a horo SOCIETA VESPERO kun danco en " Zlatý beránek" /ĉe la ĉefa placo/ ĝis la unua horo dimanĉa. Enirpago 15,-Kĉs.

dimanĉe - je la 10-a horo MATINEO DE ESPERANTISTAJ ARTISTOJ en "Zlatý beránek" /15,-Kĉs/

- inter la 13a kaj 15-a horoj komuna tagmanĝo samloke.

Ĉiu interesulo certigu por si la tranoktojn s e n p r o k r a s t e en la kampadejo /adreso: AUTOKEMPING, 276 01 Mělník, telefono 3090/. surkoverte skribu la rimarkon ESPERANTO. Pago post la alveno. Malfruaj mendoj ne estos respektataj. Skribu klare, por kiuj noktoj vi mendas la tranokton.

En hotelo LUDMILA - se vi volas tranokti lukse. La adreso: Hotel LUDMILA, Fučíkova ul., 276 01 Mělník /telefono 2578/. Informdezirojn adreso : Esperanto, poŝkesto 25, 276 80 Mělník /telefono 3058/

✧ Rondeta vivo ✧

✧VSTI NAD LABEM - Okaze de la esperantista renkontiĝo la 2.10.1a partoprenintoj per siaj subskriboj plene konfirmis sian subtenon al la Dua Stokholma Alvoko.

✧PISEK - Jam en la jaro 1935 tie bone prosperis FK, sed pro la nazia okupacio ĝi ĉesis ekzisti. Nur en j.1952, post alveno de s-ano L.Křivánek, estis fondita ER; ĝi trovis "tegmento" en Uzina Klubo de Fabriko JITEEX kaj tie ĝi atingis bonajn eblojn por kvalita laboro. Nun la rondeto havas 34 aktivaĵajn membrojn. La 8.1.1977 s-ano en Pisek ĝoje festis la jubilean datrevenon, 25 jarojn de ER en Pisek.

✧PLZENĚ - la 18.12.okazis la planita Kristnask-vespero de la okcident-bodemaj esperantistoj. Partoprenis s-anoj, krom lokaj, el Bor, Domažlice kaj Pisek. La unua parto de la Vespere havis solenan karakteron honore al 117-a naskiĝ-datreveno de d-ro L.L.Zamenhof, la dua parto de la vespero havis etosan Kristnaskan gajan. Prez. de FK Praha, s-ano Kynčl, tre bone kontribuis per sia rakontado kaj kanto al bonega humoro de ĉiuj.

✧OSTRAVA-PORUBA Kulturdomo en entreprenis "Minejoj en Ostrava kaj Karviná" festis en januaro 15 jarojn de sia ekzistado. Ĉe tiu okazo, laboruloj kaj funkciuloj de rondetoj estis honorigitaj per diplomoj, dankleteroj kaj donacoj. La prezidanto de LG ĈEA Adolf Staňura ricevis dankleteron kaj mangravuritan lignan oranman teleron pro sia poresperanta laboro. En sia programo por 1977 la Kulturdomo planas i.a. eligi regulan agadon al la esperantista grupo kaj efektiviĝi verbadon inter junularo por plialtigi la nombron de la grupanoj.

✧VSTĚN - La Rondeto aliĝis al la konkurso de ĈEA por akiro de pluaj membroj al la Asocio. Akceptita plano: aranĝi kursojn por komencantoj kaj progresintoj, partopreni Slovakian E-Kongreson, varbi por someraj Esperanto-kursoj kaj tendaroj en Lančov, Herbortice kaj Opatka, varbi abonantojn al revuo Paco kaj daŭre kontakti kun s-anoj el la amikaj landoj.

✧VINOJMO - La 6.12. okazis bone vizitita parolado de s.P.Achrer pri Samideana vizito el Tahita Insularo kaj estis aranĝita ekspozicio el bildkartoj kaj memoraĵoj.

*BOR U TACHOVA - La bildeto prezen-
tas vitrinon, kie sur aparta panelo
anoj de la klubo daurigas diskoniga-
d rezultojn de sia aktiveco : 1 500
brigadhoroj estis donacitaj al la
respubliko en tempo de la balotado ,
lau instigo de la tiea Politik- Edu-
ka Komisiono. Por Monato de Cs-Sovet-
Amikeco preparis la klubo tri pluajn
panelojn.

*BRNO - Vicurbestro de Brno d-ro M.
Schnirch akceptis la 24.11. pasintjare
trimembran delegitaron /prez. J. Von-
droušek, vicprez. d-ron ing. J. Sikula,
CSc, sekretarion Z. Hršel/ kiu venis
danki al li pro la akceptita patro-
neco super la solenoj al la 75-a dat-
reveno de la klubo. La delegitaro -
transdonis al la vicurbestro konci-
zan kvarpaĝan raporton pri aktiveco
de la klubo dum la menciita tempokaj
dokumentan materialon pri la movado.
En vigla interparolo d-ro Schnirch
estis informita pri diversaj aspekt-
oj de la klubo laboro, Surbaze de ĉi
tiu intervjuo okazis la 9.12. dekm-
nuta intervjuo en Urba Radio-Studio,
kiun partoprenis prez. kaj vicprez. de
la klubo kun redaktorino E. Křížová.

*ČESKÁ TRĚBOVÁ - La 8-a de januaro
kunvenis s-anoj el Č. Trébová, Lito-
myšl, Lanškroun, Svitavy kaj Žamberk.
Estis diskutite pri spertoj de labo-
ro por Esperanto en lokaj grupoj kaj
s-anino N. Zedníčková el Lanškroun kaj
s-ano L. Rýznar el Svitavy prezentis
novaĵojn el la komitato de ĈEA. Junu-
laro de la klubo partoprenis ski-
ekskursion al Orlické Hory. - Esperan-
to-Rondeto "Amikeco" invitas vin al
sia 8-a Esperanto-Balo la 19.2. 1977
en granda salono de UZINA Fervoĵista
Klubo je la 20-a. Informoj ĉe s-ano
J. Pištora, Náměstí míru 1746, Č.T.

*ČESKÉ BUDĚJOVICE - En oktobro ko-
menciĝis kurso por komencantoj kaj
en kadro de la klubaj kunvenoj kurso
por progresintoj. Okazis prelegoj pri
Rila Monastiro /V. Burger/, pri la se-
minario de funkciuloj en Mělník / d-
ro L. Frič/ kaj pri Rumano kun dia-
pozitivo /s-anino J. Táborská/.

*JARLONEC - La 4.12. okazis jam la
tradicie Nikolao-Vespero kun bonege
preparita amuza programo kaj granda
partopreno de s-anoj, ankaŭ el najba-
raj kluboj, krome el GDR, Pollando kaj

kvinmembra delegitaro el Varno; En
la delegitaro estis marista marista
kapitano G. Cvetkov. La gastoj vizi-
tis ankaŭ Muzeon, de vitro kaj Biju-
terio. Aperis laŭdaj artikoloj en
lokaĵ gazetoj, Turisma Rondeto de la
nomita klubo entreprenis plurajn eks-
kursoj al Ĉeĥa Paradizo kaj Jizera-
Montaro. Kaj en julio pasintjara re-
aliĝis dusemajna migrado tra sudaj
Karpatoj kun s-anoj el Jablonec, Ji-
lemnice, Bratislava kaj Meissen kom-
mune kun rumanaĵ amikoj. Pri ĉi tiu
ekskurso estas preparata monografio.
Amika kunlaboro kaj kontaktoj ekzis-
tas kun kluboj en Jelenia Góra, Zit-
tau, Zwickau, Górlitz kaj Meissen,
oficiala kunlaboro daŭras kun E-so-
cieto " Albatroso " en Varno.

*OLOMOUC - En sia ĝenerala kunveno
la 7.12.1976 estis unuanime decidite
intense labori por la internacia ling-
vgo, sole elprovita kaj servanta por
la interkompreniĝo kaj la paco. Estis
subskribita la Dua Stokholma Alvoko
kaj esprimita protesto kontraŭ aten-
cado de la internaciaj kontraktoj far
okcidentgermanaj instancoj en la afe-
ro de R. Bečvář. Pri la decidaj estis
informita la tiea PKO, ĈEA kaj redak-
cio Stráž lidu.

*OSTRAVA - La 3.11. okazis prelego
de s-ano E. Oštiatka je temo " Kun
ĈEDOK sur Cipro ", kun lumbildoj. La
10.11. pri GOSR kaj pri kunlaboro kun
sovetaĵ esperantistoj en Ivanovo pa-
rolis s-anoj D. Kočvara kaj s-anino L.
Čermáková. En esperanto-Kafejo ZK.
Slezan-Místek okazis intervjuo kun
laborantoj de televido. " Ĉe Amazono "
estis prelego de s-ano V. Sládeček
kaj la 8.12. okazis vespero al naskiĝ-
datreveno de d-ro L.L. Zamenhof.

*OSTROV NĀOHŔÍ - ER preparis por la
jaro 1977 ĉi tiun programon: la 8.5.
Letervesperon; en la tagoj 26.-28.8.
Internacian Renkontigon kun interkona
vespero, ekskurso al Perštejn kaj
Klásterec /Muzeo de Porcelano/, ami-
kan vesperon kun programo kaj danco;
la 28.8. solenan koncerton kaj ekspoz-
icion " 90 jaroj de Esperanto ". La
klubo ĉiel klopodas pri maksimuma in-
form-elekto inter la larĝa publiko
por varbi pluajn kursanojn kaj mem-
brojn. Plue ĝi turniĝis al la loka
Nacia Fronto kun peto pri necesa fi-
nanca subteno por la klubo aktiveco.



VĚSTNÍK STÁNY ZO JAFĀ-La 4.2.1977 gisvivas 70 jarojn fame konata aktivo Vladimír Blahý. Sindono kaj amo al Esperanto akompanas lin dum ĉi tuta vivo ekde lia 14-a jaro. Dum tiu tempo li senlace laboris por la movado, prelegis, gvidis nekalkuleblajn kursojn, korespondis, verkis gazet-artikolojn, prelegis en radiostacio Ostrava, partoprenis UK en Krakovo kaj Bern, plenumis funkciojn de delegito de UEA. Post la militodenoŭe li prelegis en Radio Ostrava /1945-1950/ iniciatis, organiza kunlaboris kaj instruis en Somera Esperanto-Lernejo en Požnov /1949-1953/ kaj en Prábor /1944/ en somero 1965 li estis eminentigita per Diplomoverte pro disvolvo de la ĉs.E-movado. Li kunfondis plurajn klubojn kaj rondetojn kaj estis longjara prezidanto de UK Ostrava. Persone ege modesta, amika, senlaca, oferema, senprofita, ĉiam plena de optimismo, ĉiam inter la unuaj dum pli ol duono de jarcento. Vivu longajn jarojn en plena sano, en plus aktiveco inter la esperantista familio !

Iná. Janouš

La 11.10.1976 mortis en aĝo de 66 jaroj longjara membro de klubo en Ostrava Michal Bastalák. Honoron al lia memoro !

La 7an de jan. secediĝis en Znojmo Václav Bívový kaj Jaroslav Blahaň

Forpasis la 1.10.1976 Jaroslav Holák, longjara esperantisto, komunisto kaj batalanto kontraŭ fasismo, ano de la Interbrigadoj en la hispana civitana milito.

Hazarde mi havis okazon legi la artikolon de Karolo Pič, kies titolo estas "La greka anatemo". Celo de tiu-ĉi letero estas esprimado de prekaŭ plena konsento al la ideoj de Karolo Pič. Unuflanke mi tute konsentas pri la neceso urĝe forigi el la internacia lingvo ĉiujn malfregulaĵojn. La ekzemploj pri la pluraĵ signifoj de grafo lau "IV" estas pli ol konvinka pruvo pri la minimume stranga pensmaniero de la redaktintoj. Cetere tiu aristokrata sinteno / ni klaruloj uzu klerajn vortojn el greka deveno/ absolute kontraŭas la demokratian spiriton de la movado por la internacia lingvo.

Aliflanke mi iom pli singarde tamen elĵetus el la lingvo radikojn, kiuj tamen havas ian internaciegradon, kiel "geografion", "antropologion", kaj tiel plu. Kompreneble se la radikoj estas "geografi-", la nomo de la homo kiu profesie okupiĝas pri ĝi ne povas ne esti "geografi-isto"; same pri sociologio povas okupiĝi nur sociologi-isto.

Gratulojn al STARTO, kiu iniciatis tiel interesan debaton.

Amike

Renato Corsetti



JÍŽ PATNACTY SEMINÁŘ MĻÁDEŽE ČES se bude konat ve dnech 6.-8.května v chatovém táboře Jednota v Račíně, poš. Velká Losensice, okr. Žďár nad Sázavou. Program semináře zahrnuje přednášky,

besedy, vycházky, kulturní akce a seznamovací večer. Z jednotlivých akcí uvádíme: Esperanto v Brně a na Moravě /přednáška J.Vondrouška/, Kurs esperanta a jeho vedení /V.Škoda/, literární koktejly s členy MĻadla kateří Mrštíkú v Brně, vzpomínky účastníka partyzánského hnutí na Žďársku, zasedání komise mládeži.

Písemné přihlášky, dotazy a podob. zasílejte na adresu: V.Škoda, Vaníčkova 36, 615 00 Brno 15.

El eksterlando

SOVETUNIO : Esperantistoj en T i ĥ v i n organizas ekspozicion de internaciaj politikaj afiŝoj, dediĉitan al tutmonda batalo por paco kaj amikeco. Ĉiu, kiu kontribuas al la sukceso de la ekspozicio per alsendo de afiŝo/ĵa ricevos kompense rusan popolan suveniron /Esperanto-klubo Lampiro, 187500 Tifvin, ab/k. 2, USSR.

En la ukraina urbo P o l t a v a fruktodone funkcias kursoj por komencantoj, organizataj de la loka juna klubo, kiu petas samideanojn en la mondo saluti la kursanojn-estontajn esperantistojn, skribante al la gvidanto Grigorenko, Esperanto-Klubo, Dvorec profsojuzov, Gogol-str. 10, SU-314000 Poltava, USSR.

Aktivas ankaŭ esperantistoj en Kazanĉio. La 20-an kaj 21an de novembro 1976 okazis renkontiĝo en la Ŝtata Konservatorio de A l m a A t a /Kazaĥa SSR/, kiun partoprenis kursanoj de la konservatorio, onoj de la Esperanto - kluboj "Verda brigantino" kaj "Auroro" kaj aliaj el la urbo, inter ili akademiulo S. N. Bojev kaj prof. M. M. Kopylenko. La unua Kazanĉia Esperanto-Renkontiĝo sukcesis ankaŭ dank' al gastoj el Barnaulo, Ĉeljabinsko kaj Ust-Kamenogorsko. /Raportis G. Gercikov. Komunističeskaja 278, 483310 Talgar-2, Sovetunio/.

BULGARIO : Novan g r a m' o f o n d i s k o n en Esperanto kun kantoj interpretitaj de Miŝo Zdravec oni povas ricevi ĉe Bulgara Esperantista Kooperativo /str. Neofit Rilski 18, Sofio/. Temas pri la kantoj "La unua tago de printempo" kaj "Mia gitaro". La disko kostas 0,70 levojn. En B u r g a s okazigos BEA la jam tradiciajn Internaciajn Kursojn por Esperanto-Instruistoj kaj Kursgvidantoj.

POLLANDO : Studenta Scienca Esperanto-Rondo en Bydgoszcz /8-ego Bydgoski-ego Pułku Piechoty 9/14, 85-324 Bydgoszcz/ organizas internaciajn Esperanto-tendarojn, kiujn interŝange vizitas ankaŭ studentoj el eksterlando kaj deziras ebligi kontaktojn kun studentoj en eksterlando.

62-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO : Altan protekton super la nunjara 62-a Universala Kongreso de Esperanto en Hajkjaviko transprenis prezidanto de Islando d-ro Kristján Eldjárn. En la honora komitato estas ĉefministro, ministro de kulturo kaj pluraj reprezentantoj de la kultura kaj politika vivo en Islando. Oni preparas kelkajn dokumentajn filmojn pri la islanda naturo en Esperanta mutacio kaj estas studata treege sukcesacia teatraĵo "Inuk" por la kongreso. La kvina eldono de la Universala Deklaracio de Homaj rajtoj en Esperanto estis eldonita cifoje pere de Organizo de Unuiĝintaj nacioj en Nov-Jorko. La kvar antaŭaj eldonoj aperis ĉe Universala Esperanto-Asocio en Rotterdam. La du plej grandaj Esperanto-eldonejoj, Stafeto sur Kanariaj Insuloj kaj Eldonejo TK en Danlando decidigis unuigi siajn fortojn kaj fuziis por ebligi eldonadon de la plej gravaj literaturaj ĉefverkoj.

TURISMAJ TAGOJ en okcidenta Hungario /24.-28.6.1977/ inkluzivas ekursojn al Szombathely, Kőszég, Celldömölk kaj Kormend. Aliĝdato : 20.2.1977. Pli detalaj informoj ĉe la Organiza Komitato, H-9901 Kormend, pf. 11. Hungario.

Korespondi deziras

Szöke Lajos, H-3732 Kurityán, Kosuth ut. 34, Hungario o Walter Petrowich, Pensionat Hommes, Centro Psikoterapia, 46370 Leyme, Francio o V. Gakalenko, 187 500 Tifvin-6, p.k.2, USSR /Esp. librojn kontraŭ diapozitivoj ktp./ o Rusana Vasileva, 19j, abiturentino, 9850 Preslav, ul. P. Volov 3, Bulgario o Rafael Serrano R., Kesto Aerpoŝta 27953, BOGOTO, Kolumbio o A. Jansa, 22j, stud., Sinkuleho kolej, Zikova 13, 166 06 Praha 6, CSR o V. Trojan, 46j, invalido, B. Němcová 364/B, 542 01 Zacléř o LITERVYNEPESON arangos la 14.4.1977 Pionira taĉmento TET, ZDS L. Novomeského, 98401 Lučenec, CSR. Al ĉiuj oni sendos bildkarton.

Který esperantista v Praze pro -
najme byt /pokoj/? Odpověď zaš-
lete na adresu svazu.

: Zprávy ze sekretariátu :

OSLAVY ESPERANTSKÝCH VÝROČÍ. Předsednictvo svazu určilo na 5. března 1977 den zahájení oslav 90. výročí vzniku esperanta a 75. výročí vzniku druhého nejstaršího klubu v českých zemích- Klubu esperantistů v Praze. Zároveň bude vzpomenuo 60.výročí smrti autora esperanta dr.L.Zamenhofa.Všechny naše členy zveme na tuto ojedinělou slavnost v sobotu do Městské knihovny, malého sálu v Praze 1,Nám.dr.Vacka, kde bude instalovaná i malá výstava, přístupna asi od 11.hod. Vlastní zahájení oslav předpokládáme asi ve 13.30 hod. Náplní oslav je slavnostní zasedání předsednictva s projevy k uvedeným výročím a kulturní program asi do 18hod. Ubytování ani stravování nezajišťujeme, vstup je volný. Přiveďte i svoje přátele neesperantisty. Bližší informace podají vedoucí místních skupin v druhé polovině února.

MĚSTSKÁ SKUPINA ČES, v Jablonci nad Nisou, /pošt.schr.190/ uspořádá 23.dubna 1977 již tradiční sportovní akci " Kilometry přátelství". Počítá se i s mezinárodní účastí. Přihlásit se může každý zájemce.Bližší informace si vyžádejte na výše uvedené adrese.

JIŽ OSMÝ SETKÁNÍ ESPERANTISTŮ bude ve dnech 22.-24.4. v Mělníku s pestrým a bohatým programem. Společenský večer s tancem, výlety do okolí, schůzky sekci a komisí svazu, kulturní program. Bližší informace podá: Místní skupina ČES, pošt.schr.25, 276 01 Mělník, příp. na č.tel. 3058.

VŠECHNY ČLENY, kteří ještě nepoukázali členský příspěvek na rok 1977 žádáme, aby tak učinili co nejrychleji. Toto číslo Starta je poslední, které letos dostanou, neobnoví-li své členství ve svazu. Všichni, kdož to s našim esperantským hnutím myslí poctivě si jistě uvědomují, že členská základna je jedna ze základních podmínek další práce.

JEŠTĚ pro tento rok máme možnost předplatit několika zájemcům Heroldo de Esperanto vydávaný v Belgii. Informace na adrese svazu.

Zájemci o individuální členství a funkci delegáta UEA nechtě se informují u hlavního delegáta UEA Linharta Rýznara, Ant.Slavička 22, Svita-vy.

VŠEM NABÍZÍME mnoho titulů esperantské literatury. Jejich koupí můžete zlepšit finanční situaci svazu a umožníte vydání dalších knih. Rovněž tak nabízíme i další materiály, které vám budou k užítku. Pomozte propagovat esperanto samolepkami s českým textem u neesperantské veřejnosti. Vytvářejte tím povědomí o existenci esperanta. Nižší vám uvádíme několik zajímavých titulů a dalších materiálů z naší i zahraniční produkce. Jsou to i vhodné dárky pro vaše zahraniční přátele:

EDICE ČES

P.Bezruč : Sileziaj kantoj	Kčs	11,--
K.Čapek : Apokrifoj	Kčs	12,--
Franca arto en Ĉeĥoslovakio	Kčs	3,--
J.Nesvadba: Ia perdita vizago	Kčs	15,--
Ing.M.Tůma: Pri la varmo	Kčs	21,--
W.Auld : Paŝoj al plena posedo	Kčs	19,--
O.Kníchal: Komenio kaj Internacia Lingvo	Kčs	4,--
Ĉeĥoslovakio /Tridek jaroj/	Kčs	7,--
Kultura almanako Panoramo 1975/du volumoj/	Kčs	16,--
Poŝtlaso de la mondo	Kčs	20,--
Rozhlasový kurs	Kčs	12,--
ESPERANTOŬI EDICE			
Oru duopo /Maĉarsko/	Kčs	17,--
Okupacio /SSSP/	Kčs	8,--
Sklavoj de Dio /Maĉarsko/	Kčs	50,--

Rozmowki za esperanto /Polsko/	Kčs	10,--
La naciaj malplimultoĵ /Vietnam/	Kčs	5,--
Danĵo en Vjetnamio /Japonsko/	Kčs	10,--
Estonio /SSSR/	Kčs	6,--
Kalevipoeg /SSSR/	Kčs	5,--
RD Vjetnamio /Vietnam/	Kčs	5,--
Tallin /SSSR/	Kčs	16,--
Sercioj rakontoj /Maĉarsko/	Kčs	5,--
La sep reĝidoj /Maĉarsko/	Kčs	24,--
Plumo kaj suno /Dánsko/	Kčs	21,--
Hasanagaino /Jugoslavio/	Kčs	5,--
Nuda inter lupoj /NDR/	Kčs	38,--

*UČEBNICE ESPERANTA

T. Kilián : Učebnice pro začátečníky	Kčs	18,50
J. Cink: Učebnice pro pokročilé	Kčs	15,--
R. Hromada: Slovník česko-esperantský a esperantsko-český	Kčs	14,50

Letáky /plakáty/k pořádání kursů	Kčs	1,--
Dopisní papíry 10 ks /esp./tisk/	Kčs	5,--
Samolepky s českým textem /28 ks-arch/	Kčs	6,--
Samolepky: Per esperanto por la paco /24 ks - arch/	Kčs	5,--
Samolepky: Esperanto parolata /arch 3ks/	Kčs	3,--
Samolepky Lančov 1 ks	Kčs	1,--

Odznaky od 5 Kčs do 7 Kčs jsou v těchto družicích: Odznaky ze SSSR, MEM, hvězda, Pražský klub, Lančov, Mělník, Opava, Amiko de Esperanto, KKEI, šachistický, odznak esperantistů ČSSR, odznak trojúhelník -ESPERANTO. Některé odznaky jsou v několikabarevném provedení.

Objednávky nad 50.-Kčs zasíláme zásadně na dobírku. Základním organizačním svazu poskytujeme slevu u objednávek nad Kčs 300,- ve výši 10%. Některé tituly máme jen v malém množství. Objednávku vyřídíme ihned, jakmile knihy opět dostaneme. Seznam nevyčerpává veškeré možnosti našeho skladu.

Objednejte si časopisy PACO /30.-Kčs ročně/.Obdržíte všechny nově vydané separáty PACO zdarma./Jsou to téměř všechny publikace vydané ČES/. Objednáním "PANORAMO" a "MEDICINISTAJ INFORMOJ" získáte kompletní ročník Starta. Informujte se v sekretariátu. Všem abonentům poskytneme zdarma obálku na příslušný ročník.

*METODICKO-PROPAGAČNÍ KOMISE SVAZU žádá všechny členy svazu, funkcionáře místních skupin i řadové členy, kteří chtějí komisi pomáhat - ať už prací nebo nápadem - aby se přihlásili u vedoucího komise /Zd. Hršel, Botanická 28, 602 00 BRNO/. Přispějte k šíření dobrých zkušeností, jak pracovat s členy místních skupin, začátečníky i pokročilými, jak získávat nové a rozšiřovat informace o esperantu ve veřejnosti.



STARTO - tiskový orgán ČES. Vychází 6x ročně. Řídí redakční rada ve složení: odpovědný redaktor O. Knichal; zástupce dr. J.Jermář; členové: J. Cink, Z. Hršel, J. Mařík, J. Vondroušek, ing. J.Werner, ing. V.Kočvara, Z. Křimský a J. Klement. Tiskne rozmnožovna Podniku služeb Neratovice.

**v něm se
bude vaše dítě
cítit nejlépe**



**MÓDNÍ
SKLADNÝ
PROSTORNÝ
PRAKTICKÝ
LEVNÝ**





generální opravy
zadních skříní
a předních os
veškerých typů
kolových traktorů
v Československu
vyráběných



PROVÁDÍME



*** ZETOR SUPER 50
I. a II.
Unifikovaná řada**



VÝMĚNNÝM ZPŮSOBEM

Mimo to generálkujeme
u těchto typů traktorů
hydraulická zařízení
a řízení u ZS 50

OPRAVNY ZEMĚDĚLSKÝCH STROJŮ n. p.

telefon 91 22 43
telex 0186293

JABLONNÉ V PODJ.